

Heinrich Heine,  
La ruĝaj teksistoj

*tradukita de Emil Pfeffer*

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,  
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:  
Malnova mond'! Ni teksas en pen'  
Morttukon al vi kun triobla malben' -  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun preĝo  
Turniĝis en frostoj, malsato kaj neĝo  
Ni kaj atendadis en vana esper' ...  
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer' -  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de riĉaj,  
Senkora vampiro por ni malfeliĉaj,  
Senigis li nin de la lasta mon',  
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon' -  
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,  
Kie regas tiaj vampiroj en bando,  
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu jun-flor',  
Protekt' nur por vermoj, putraj', malhonor' -  
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,  
Die schlesischen Weber

Im düstern Auge keine Träne  
Sie sitzen am Webstuhl und fletschen die Zähne:  
Deutschland, wir weben dein Leichentuch,  
Wir weben hinein den dreifachen Fluch -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, zu dem wir gebeten  
In Winterskälte und Hungersnöten;  
Wir haben vergebens gehofft und geharrt,  
Er hat uns geäfft, gefoppt und genarrt -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König der Reichen,  
Den unser Elend nicht konnte erweichen,  
Der den letzten Groschen von uns erpreßt  
Und uns wie Hunde erschossen läßt -  
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlande,  
Wo nur gedeihen Schmach und Schande,  
Wo jede Blume früh geknickt,  
Wo Fäulnis und Moder den Wurm erquickt -  
Wir weben, wir weben!

...

Heinrich Heine,  
La Sileziaj teksistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante  
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:  
Ni teksas trioblan malbenon por vi  
En vian morttukon, Malnov-Germani'.  
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, al kiu pro nia  
Mizero ni preĝis en kredo pia;  
Ja vane esperis, atendis ni,  
Nin mistifikis kaj trompis Li.  
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi reĝ' de l' riĉuloj,  
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,  
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el ni,  
Kiel hundojn nin pafmortigigas li.  
Ni teksas, ni teksas.

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,  
Kie nur prosperas la koterio,  
Kie estas rompata ĉiu juna flor',<sup>3</sup>  
Kie regas de l' putro la odor' -  
Ni teksas, ni teksas!

...

<sup>3</sup>Kie frue rompatas ĉiu flor',

Kaj krakas teksilo kaj flugas ŝipet',  
Ni teksas sen ĉes', kun la mort' pro l' vet' ...  
Malnova mond'! Ni teksas en pen'  
Morttukon al vi kun triobla malben' -  
Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de EMIL PFEFFER (\*1891-12-16 - †1965-11-20) en 1929.*

Arg-240-481 (2004-05-24 22:44:39)

*La traduko de Emil Pfeffer aperis en la sveda revuo "Svenska Arbetar-Esperantisten" (= "La sveda laborista Esperantisto", en la septembra-oktobra numero de 1929, sur paĝo 83. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiujn informojn kaj la tradukon de Emil Pfeffer en la libro "Verkoj de Heinrich Heine" de Adolf Holzhaus, eldonita en 1973 de la "Esperanto-Ligo en Israelo".*

Das Schiffchen fliegt, der Webstuhl kracht,  
Wir weben emsig Tag und Nacht -  
Altdeutschland, wir weben dein Leichentuch,  
Wir weben hinein den dreifachen Fluch,  
Wir weben, wir weben!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17), publikigita 1846.*

Arg-240-479 (2004-06-02 11:33:30)

*Ursprünglicher deutschsprachiger Text der zweiten Fassung des Gedichtes, die im Jahr 1846 von H. Püttmann in der Gedichtsammlung „Album. Originalpoesien“ – mit dem Vermerk „vom Dichter revidiert“ - herausgegeben worden ist. [Laut Netznachricht vom 27.05.04 des Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf, Frau Marianne Tilch.]*

Navedo flugas kaj krakas teksil',  
Ni teksas senlace dum nokta trankvil' –  
Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,<sup>4</sup>  
Enteksas trioblan malbenon ni,  
Ni teksas, ni teksas.

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATTISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05-31.*

MR-347-2-1 / Arg-240-489 (2004-06-02 11:46:37)

*Esperantigo laŭ la dua germanalingva teksto, kiu estis – kun la rimarkigo "de la poeto reviziita" – eldonita en 1846 de H. Püttmann en la volumo "Album. Originalpoesien" (= "Albumo. Originaj poeziĵoj"). [Laŭ interreta informo de l' 27.05.2004 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]*

---

<sup>4</sup>Morttukon, ni teksas por vi, Germani',  
Trioblan malbenon enteksas ni.